

SVISA ESPERANTO - SOCIETO


INFORMAS

N-ro 5/1993

SEPTEMBRO-OKTOBRO

1882

Trafikdomo Luzern



LA ĈEVALO-TRAMO de Zürich estis inaŭgurita en la jaro 1882. Dum 18 jaroj ĝi fidele veturis en la urbo, sur reto de preskaŭ 9 km da reloj. Ne malpli ol 160 ĉevaloj estis necesaj por tiu trafiko kaj 130 dungitoj prizorgis la necesajn laborojn.

Kvankam ekzemple veturo de "Stock" (hodiaŭa haltejo Brunaŭstrasse) ĝis la ĉefstacidomo kostis tiutempe 10 centimojn, la akcio-posedantoj eĉ ankoraŭ profitis de la jara gajno!

(El priskribo de la trafikdomo. Tradukis FL. Publikigo kun la konsento de la trafikdomo. Konforman anekdoton vi povas legi sur paĝo 3.

GRUPAJ INFORMOJ

ESPERANTO-SOCIETO BASEL:

30.9.19.00h Monata kunveno: Invito ĉe gesinjoroj Bérout-Focke en Inzlingen. (Aparta informili sekvos).

BELLINZONA:

Ĉiam la unuan sabaton en Viale Motta 32, je la 1700h. Ĉiu estas bonvena.

ESPERANTO-SOCIETO BERN:

7.9.19.30h en restoracio Al Forno, Spitalgasse 37.
En oktobro ni ferios.

2.11.19.30h en Al Forno.

ESPERANTO-SOCIETO BIEL:

17.30-18.30h Ĉiun vendredon en restoracio Mandarin, Dufourstrasse 41.

LUCERNA ESPERANTO-SOCIETO:

En restoracio Simplon, Habsburgerstrasse 16.

8.9.14.00-16.00h en Big Ben. Gvido Franz Brügger.
(Merkredo)

22.9.20.00h En restoracio Simplon.

(Merkredo) "Esperanto en Svislando". La SES-prezidanto provos respondi al niaj demandoj, kiujn li ricevis de ni en printempo.

14.10.20.00h En restoracio Simplon: "Surprizoj".
(Ĵaŭdo)

ESPERANTO-SOCIETO NEUCHÂTEL:

Ĉiumonate iun vendredon, laŭ ebleco de la membroj.

ESPERANTOKLUBO WIL:

En restoracio Schweizerhof, Bahnhofstrasse 18.

6.10.20.00h "Ludvespero": Gvidos L. Sennhauser kaj V. Chaves-Walder.

ESPERANTO-SOCIETO ZUERICH:

2.9.17.00h kaj 9.9.17.00h varbostando en Bahnhofstrasse. Informas telefono 156 54 34.

13.9.19.00h Monata Kunveno en Karl der Grosse.
Publika prelego pri la historio de Esperanto.

13.-18.9. Esperanto-Semajno kun stand-agado en la urbo-centro.

- 18.9.20.00h okazos Esperanto-Kantvespero en Hotelo "Krone Unterstrass". (Detala informo sur paĝo 5.
- 27.9.19.00h Libera kunveno en kafejo Valentino, Münsterergasse 4, supre de Grossmünster.
- 30.9.17.00 kaj 14.10.17.00h Varbostando en Bahnhofstrasse. Informos tel: 156 54 34.
- 9.10.10.30h Sabato: Internacia Esperantotago: Publika matenmanĝo sur la "Pestalozzi-Herbejo" (Bahnhofstrasse). Ĉe duba ventero la prezidanto donos informon, telefono 251 50 25, ĝis la 09.30h.
- 11.10.19.00h Monata kunveno en Karl der Grosse. Raportoj pri la Universala Kongreso en "Valencia".
- 25.10.1900h Libera kunveno en kafejo Valentino.

ooOoo

ANEKDOTO PRI LA ĈEVALO-TRAMO EN ZUERICH (en la ĉiutaga lingvo ĝi nomiĝis ĉevalet-tramo)

Kiu siatempe veturis per tiu ĉevalet-tramo? Maljunuloj, handicapitoj kaj la nobeluloj, sed kiu devis prizorgi urĝan komision, tiu prefere iris piede. Siatempe, en mia profesia lernotempo, mi foje veturis per la ĉevalettramo de "Stock" (hodiaŭa haltejo Brunaustrasse) tra Paradeplatz al la ĉefstacidomo, kio kostis dek centimojn. Subite mi ekvidis mian ĉefon en la sama vagono. Tute ne atendite li alkriis min en la vagono, dirante: "ĉu vi povis heredi, ke vi veturas per la tramo? Vi ankoraŭ havas junajn gambojn, do vi povas piediri, ĉar tiaj friponoj ne estu en la tramo!"

Alveninte en la Paradeplatz mi hontigite eliris, irante la reston de la vojo piede kaj preskaŭ samtempe kiel la ĉevalettramo atingis la ĉefstacion!

Tradukis FL-

oo0oo

Venontaj aranĝoj - 4 -

SEPTEMBRO 25-26

Finmonata Stud-semajnfino

Kurso A) Por komencantoj:

Kurso B) Por progresantoj:

Kurso C) Por lertuloj:

Pentagramo verde strekita:

la muzika flanko de la Esperanto-kulturo.

kun Giorgio SILFER (Eŭropo), aŭtoro de kanzon-tekstoj por Nikolin', TEAM, Gianfranco Molle.

La kurso celas esplori la muzikan flankon de la esperanto-kulturo en la lasta jardeko. Tre interesa ne nur por personoj aktivaj en tiu specifa kampo.

KCE KULTURA
CENTRO
ESPERANTISTA

OKTOBRO 24-29

Lingvo-kurso por komencantoj

kun instruistoj de la KCE-a Instruista Skipo.

Dum tiu 6-taga feria studsemajno, la lernantoj eklernos Esperanton kaj konatigos kun diversaj aspektoj de tiu lingva fenomeno kaj de la movado. Ili jam uzos siajn novajn konojn en ĉiutagaj situacioj kaj tiel firme solidigos la akiritan bazon.

Tuj post la kurso, ili havos la okazon plonĝi en kutima esperantista etoso kun la esperantistoj, kiuj partoprenos en la finmonata stud-semajnfino anoncita ĉi-poste.

Partoprenkotizo: CHF 180,-

(Por manĝoj kaj ĉambroj, vidu paĝon 23. Enkalkulu kvin tranoktojn)

OKTOBRO 30-31

Finmonata Stud-semajnfino

Kurso A) Por komencantoj:

Kurso B) Por progresantoj:

Kurso C) Por lertuloj:

Diskutforumo: Esperanto hodiaŭ, kaj plue?

kun Andy E. KUNZLI (Svislando), licenciito pri slavistiko kaj internacia juro; sekretario de Svisa Esperanto-Societo, komitatano de KCE, eksa aktivulo de TEJO.


Sobra analizo de la nuntempa stato de Esperanto kaj diskuto pri ĝia estonta rolo. La forumo celas kaj fakulojn kaj la ĝeneralan publikon, kiu interesigas pri la temo.

Esperanto-Societo Zuriko

-5-



&



prezentas:
sabaton, 18an sept. 1993
20.00 h:

Esperanto-Kantvesperon
kun la LF-premiitoj

Klára Mikola
László Garamvölgyi
el Hungario

Hotelo Krone Unterstrass
Schaffhauserstrasse 1
CH-8006 Zürich (Tramo 11/14)

Esperanto-Societo Zuriko
Postfach 301 / 8034 Zürich
Tel. 156-5434 (Fr. 1.-/Min.)

Enirprezo Fr. 5.-
Eintritt Fr. 5.-

**EN LA UNUA DUONO DE LA JARO 1993 SES RICEVIS
LA JENAJN DONACOJN, POR KIUJ LA ESTRARO TUT-
KORE DANKAS:**

W. Gasser 10.-, E. Glättli 10.-, F. Mottu 70.-
A. Koller 20.-, J. Hohl 20.-, F. Liechti 20.-,
E. Walder 10.-, W. Laederach 30.-, G. Gacond 20.-,
L. Dovat 10.- W. Kobelt 20.-, J. Bipp 20.-
B. Spalinger 30.-, D. Bühlmann 50.- R. Schnee-
beli 20.-, Chr. Sixtus-Pot 100.-, W. Bohren 20.-
H. Sandmeier 10.-, R. van Puijenbroek 10.-
H. Siebers 30.-, T. Gamper 20.-, P. Dorthe 20.-,
D. Bertolini 100.-, J.-P. Brunod 10.-
Entute Fr. 680.-

ooOoo

**POR "AGADO 2003" ESTIS EN LA UNUA DUONO DE 1993 LA
JENAJ KONTRIBUOJ:**

C. Gacond 25.-, F. Liechti 20.-, T. Carlevaro 40.-,
G. Weill 20.-, D. Rooke 100.-, L. Ortelli 20.-, A.
Weidmann 15.-, W. Schaufelberger 50.-, R. Schmid 20.-,
H. Reymond 100.-, B. Graf 50.-, F. Badoux 50.-, Ch. C.
Georget 50.-, G. Jehle 20.-, E. v. May 30.-, W. Gianni-
ni 50.-, RW. Perrenoud 50.-, S. Kaufmann 100.- J. K. E.
Lavanchy 50.-, P. Scherer 50.-, H. Ringli 10.-
Entute Fr. 920.-

Ankaŭ por tiuj-ĉi kontribuoj la estraro sincere dan-
kas al ĉiuj.

ooOoo

INFORMO DE LA NOVA SVISA ĈEFDELEGITINO

kaj perantino por la UEA-Kongreso:

Numero de la poŝtĉekkonto: 60-104960-2

SONJA BRUN
ESPERANTO
Küntwilerstrasse 50
6343 Rotkreuz

Nova adreso ekde la 1.10.1993:

Waldeggstrasse 28
6343 Rotkreuz

oo0oo

**ĈU VI JAM KONAS LA ILUSTRITAN EKOLOGIISMAN
GAZETON EN ESPERANTO? ĜIA NOMO ESTAS "VERDire"**

Temas pri 24-paĝa A4-ĵurnalo. La ricevita recenznumero estas tre enhavoriĉa, traktante diversajn interesajn temojn. La prezo por 4sin-sekvaj numeroj estas 370 belgaj frankoj aŭ 13 internaciaj respondkuponoj.

El la enhavo mi citas kelkajn temojn, kiel:
Naturprotektado, rabobirdoj revenas.

Ĉu ŝparemo povas savi la mondon?

Mallonge pri Svisio, Norvegio kaj Germanio.

Burundia projekto.

Ruboj niaj ne estas fataleco.

Polico sur du radoj kaj sen bruo.

Senpaga busetlinio en Helsingborg kaj multaj aliaj.

Respondeca eldonanto estas

Sinjoro

Jean-Claude Thumerelle

Rue Pierre de Simpel 10

B-7784 Warneton

-FL-

oo0oo

S E L SARLANDA ESPERANTO-LIGO INFORMAS, KE

de la 10-a ĝis la 12-a de decembro 1993 okazos la **42-a KULTURA SEMAJNFINO** de la Sarlanda Esperanto-Ligo (SEL). Laŭtradicie ĝi okazos en la Kardinal-Wendel-Domo en D-66424 Homburgo.

Funkcios:

- a. Enkonduka kurso por komencantoj estrota de Karl Burger.
- b1. Parolaj kaj legaj ekzercoj por progresantoj, kun Krešimir Barkoviĉ el Parizo, kursestro.
- b2. Stilistikaj kaj literaturaj ekzercoj, kun Eddy Borsboom el Nederlando kiel kursestro.
- c. Seminario por spertuloj. Prelegos d-ro Erich-Dieter Krause pri leksikologiaj kaj -grafiaj demandoj.

Krome okazos regionaj vizitoj, vesperaj konversaciaj rondoj kaj ekumena Di-Servo. Kaj por la infanoj venos, kiel kutime, la Sankta Nikolao.

Pluajn informojn - kiam, kien kiel veni, kiom pagi, kiel tranokti ktp. - bonvolu ĉerpi el la rozkolora informilo, ricevebla ĉe la redakcio de SES INFORMAS. Aldonu al vi afrankitan koverton. Dankon. -Red-

ooOoo

KULTURA CENTRO ESPERANTISTA:

"Grava parto de Esperantuj o"
V e n u

esperantiĝi - progresi - esperantumi - kongresi -

Postulu nian riĉan programon! Aliĝu tuj!

PF 779 2301 La Chaux-de-Fonds tel:039/26 74 07.

ooOoo

NEKROLOGOJ

En 'SES informas', n-ro 2/92, aperis la trista informo pri la forpaso de nia estimata samideano **Alexander THALER**. Intertempe, Andy Künzli, la redaktoro de la leksikono-enciklopedio 'Esperanto kaj Interlingvistiko en Svislando', sukcesis akiri pli da sciigoj pri la vivo de Thaler kaj kompilis la sekvantan biogramon. Ĉu oni eble povus rakonti pli multe pri lia esperanta aktiveco?

THALER Alexander

Alemano naskita la 4an de aprilo 1923 en Andwil (SG), mortinta pro korapopleksio la 6an de februaro 1992 en Ebnat Kappel (SG). Post vizito de la bazlernejo en Andwil li frekventis la redemptoristan gimnazion 'Drei Aehren' en Alzaco kaj Bertigny (FR) kaj faris la abiturion en la kantona gimnazio de Friburgo. Li studis teologion kaj filozofion en diversaj universitatoj. Poste li decidis iĝi instruisto en sekundara lernejo; la klerigon por tiu profesio li trapasis en la pedagogia altlernejo de St.Gallen. Sian unuan postenon li okupis en 1950 en la internacia instituto sur Rosenberg en St.Gallen (gejunuloj de 36 nacioj vizitis tiun lernejon). Poste li ŝanĝis al pli malgranda sekundara lernejo en Häggenschwil (SG), kie li ankaŭ kunkantis en la vira kaj katolika eklezia ĥoroj, gvidis teatrojn, funkciis kiel prezidanto de la eklezia konsilio, ktp. De 1973 ĝis la emeritiĝo li vivis kaj laboris en Ebnat-Kappel. Kiel kulture interesita homo li ekzemple akompanis eksursojn al Ravenna (Italio), kie li detale klarigis la surlokajn mozaikojn. Li trapasis ankaŭ la rekrecian lernejon kaj servis dum la dua mondmilito. Thaler estis edzo kaj patro de unu filo.

Thaler lernis E-n memstude en la 70aj jaroj kaj iĝis aktiva membro de la Esperanto-Klubo Wil kaj de SES.

'SES informas', n-ro 1/93, anoncis la bedaŭrindan morton de nia ŝatata samideano **Hans Noll**. Ankaŭ en tiu ĉi kazo, Andy Künzli, rilatinte kun lia filo, Hanspeter Noll, eksciis pli multe pri la vivo de la forpasinto. Jen do la biogramo de Hans Noll.

NOLL Hans

Alemano naskita la 15an de septembro 1903 en Au (SG) kiel filo de lingardisto, mortinta la 2an de septembro 1992 en Dietlikon (ZH). Post vizito de la lernejoj en Montlingen (SG), Rheineck (SG) kaj Buchs (SG) li lernis la profesion de stacidoma oficisto de SBB/CFF/FFS en Haag-Gams (SG) kaj enoficiĝis en 1923. Li laboris en la fervojdistriktoj II kaj III kaj en Wetzikon (ZH), Wollishofen (ZH) kaj de 1940 en Wallisellen (ZH), kie li finis sian karieron kiel subĉefo. Kiel diligenta lernanto, kiu ĝuis la subtenon de instruistoj kaj konatoj, Noll dumvive interesigis pri lingvoj. Li estis edzo kaj patro de unu filo.

1932-92 Noll estis membro de SAEF (1952-72 ĝia kasisto); 1972 ankaŭ LKK-kasisto de la 7a IFEF-kongreso en Zuriko. Krome, pli ol 50 jaroj li aktivis en la zurika ES. Li apartenis ankaŭ al SES kaj dum certa periodo estis eĉ ĝia estrarano (ĉ. 1959 kasisto). La asocio nomis lin honora membro.

oo0oo

SENTENCO

Kredo al libera kaj paca estonteco de la homaro kondukas al jesado de planlingvo, ĉar nur sociala justeco povas krei pacon en libereco.

El Ekumena Forumo tradukis -FL-

oo0oo

PASIS LA 78a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN VALENCIA

Granda grupo da svisaj gekongresanoj ĉeestis la 78-an Universalan Kongreso de Esperanto en la iama ĉefurbo de la samnoma reĝolando Valencio. Dum la tradicia inaŭguro nome de nia lando salutis la JES-kaj ESZ-ano Rolf Ernst. Mi pasis multajn horojn en la komitato, pri kies laboro kaj decidoj mi raportos post la apero de la protokolo detale. La plej juna kongresano estis nia filino, Linda, kiu staris en la centro de la atento de multaj kongresanoj. Ŝi sentis sin tre bona kaj estis la sola kongresano, kiu certe neniam krokodilis. Unu el la kulminaj momentoj estis dum la interkona vespero giganta paella (pajela) por 2000 personoj, kuirita en unu sola ujo. Bedaŭrinde kelkaj el la kongresanoj estis priŝtelitaj. Tamen, je la kvina kongrestago iu Esperantista Ŝerloksholmo sukcesis kapti la geŝtelistojn.

La venonta Universala Kongreso de Esperanto okazos en Seŭlo, kaj mi rekomendas al Vi jam nun ŝpari por ne maltrafi tiun eventon en Orientazio.

Dietrich M. Weidmann

oo0oo

A T E N T U :

Unu semajnon post la redaktfino de SES INFORMAS mi ricevis leteron el Jugoslavio, en kiu oni petas pri helpo por malsanuloj. Mi do dismuntis la jam finpreparitan "SI" por aldoni tiujn vokojn por helpo kaj la indikon de kelkaj bezonaj medikamentoj.

Leviĝas la demando, ĉu oni devus instali "helpservon", kiel ni faris post la lasta mondmilito.

Dankon pro via kompreno kaj via opinio.-FL-

oo0oo

Estimataj gesamideanoj,

Ni informas vin, ke multaj rifuĝintoj troviĝas en la urbo Niŝ-Serbio-Jugoslavio. Inter ili multaj infanoj sen aŭ kun patrinoj, ankaŭ gemaljunuloj, multaj el ili estas malsanaj. Ili ĉiuj bezonas diversspecan helpon.

Ni ĉiuj ricevis medicinan helpon, nur mankas diversaj medikamentoj, ĉar internacia BLOKADO malpermesas rapidan sendon de jam aĉetitaj aŭ sendotaj. Pro ni petas vin, laŭ via ebleco, sendu al ni bezonatan helpon. Plej grave estas medikamentoj por niaj malsanaj homoj.

Helpon vi povas sendi al la sekvantaj adresoj: Internacia Ruĝa Kruco por Jugoslavio, kiu sendos helpon al regiona Ruĝa Kruco en Niŝ (Medjunarodni crveni krst za Jugoslaviju, za oblast grada Niŝa), aŭ al oersona adreso: Esperanto-Societo "Ĉele kula" Voždova 24, 18000 Niŝ, Jugoslavio.

Plej multe necesas estas la medikamentoj:

Beriplas 12 skatoloj

Histakril 10 " "

Surgicel 10 " "

Bone Wax 10 " "

Formalin-tablojdoj

Lio dura 100 pecoj

Adreso: Neŭrohirurŝka Klinika (za d-ro Zoran Milenković) 18000 Niŝ Jugoslavio.

En la urbo Tuzla, kie mi vivis kaj kie restis miaj familianoj, la situacio estas terura. Multaj geesperantistoj kaj serboj restis en la urbo kun malgranda ŝanco eliri el Tuzla. Multaj eliris, ĉar reganta reĝimo ne permesas.

En Tuzla ekzistas multaj humanaj organizaĵoj, sed ili helpas al sia (nacio) simpatia anaro, sed serba humana societo preskaŭ nenion ricevas. Pro tio ni petas vin informi ĉiujn geesperantistojn en la mondo pri nia situacio.

Ĉiuspecan helpon, precipe manĝaĵojn por infanoj, oni povas sendi al:

Internacia Ruĝa Kruco Bosnio-Tuzla Medjunarodni Crveni Krst Tuzla-Bosna, za humanitarno društvo Dobrotvor.

Rimarko: Por ke vi povu sendi humanan helpon per diversaj vojoj, vi devas havi atestitajn dokumentojn de komisariato por rifuĝintoj.

Multajn salutojn de geesperantistoj el la urbo Niŝ kaj rifuĝintoj.

Esperanto-Societo, "Ĉele Kula"
Niŝ.

oo0oo

BIPP Hans - 80-jara

La fervojisto

Alemano naskita la 21an de majo 1913 en Wil (SG). Post vivado en Zuriko (1943-71) kaj Friburgo (1972-83) Bipp ekloĝis en Birsfelden (BL), laste en maljunulejo. Vizitinte la trafikajn lernejojn en St. Gallen, Bipp 1931-33 lernis la profesion de stacidoma oficisto. En 1935 li restadis duonjare en Londono por perfektigi en la angla lingvo. 1936-39 li deĵoris ĉe diversaj stacidomoj en Romandio kaj tiuokaze ekregis ankaŭ la francan lingvon. Sekve, li unue laboris kiel informeja oficisto en la zurika ĉefa stacidomo kaj poste estris la informejan oficejon en Zuriko-Paradeplatz. Lia profesia kariero kulminigis per la funkcio kiel administra oficisto ĉe la Ĝenerala Direkcio de SFF en Berno. Bipp estas ano de la Sendependa Eklezio, edzo kaj patro de 7 infanoj.

La esperantisto

Bipp lernis E-n en 1929 en kurso en St. Gallen pere de Rudolf Gottlieb Maeder. Baldaŭ Bipp iĝis unu el la plej signifaj aktivuloj precipe en SAEF, kies pioniro li estas (aliĝo en 1932). Klopodante post la dua mondmilito por la restarigo de SAEF, li kreis kun

Emil Keiser provizoran estraron, transformis la tiaman SAEF-'amikaron' al organizita societo, serĉis kontakton kun la romandaj kolegoj (precipe Ch. Baumgartner en Laŭzano) kaj kompilis aktualan adresaron. Sekve, 1945-72 Bipp response laboris por SAEF: kiel ĝia kasisto (1950-52), prezidanto (1952-56) vicprezidanto (1956-58), asesoro (1958-69) kaj komisiito (1969-72). Dum la 1950aj jaroj Bipp gvidis ankaŭ E-kursojn en Zuriko.

Estante funkciulo de SAEF kaj membro de SES, Bipp engaĝiĝis ankaŭ internacie (IFEF): En 1949 li partoprenis kun Keiser la 1an IFEF-kongreson en Aarhus (Danio), en 1951 ĉeestis la 3an IFEF-kongreson en Parizo, en 1953 kunorganizis la IFEF-postkongreson en St.Gallen kaj en 1955 mem prezidis LKK-n de la 7a IFEF-kongreso en Zuriko. 1975-89 li kunlaboris ankaŭ en la Terminara Komisiono de IFEF por traduki la 6-lingvan 'Ĝeneralan Vortaron de Fervojaj Terminoj' de Internacia Fervoja Unuiĝo (IFEF eldonis la E-verkon en 1989).

Inspirita de similaj streboj en Francio, Bipp sugestis en 1952 la fondon de Svisa Unuiĝo Arta kaj Intelekta de Fervojistoj (UAISF), kies unua vicprezidanto li iĝis (apud Emile Birbaum kiel ĝia prezidanto). En tiu ĉi organizaĵo Bipp estis estrarano kaj delegito ĝis 1972. UAISF nomis lin honora membro.

Okaze de la 50-jara jubileo de SAEF en 1975 Bipp verkis kunlabore kun Kurt Greutert detalan historion pri SAEF, kiu publikiĝis en 'Svisa Fervojisto' 78/1975. En 1985 pro privataj kaŭzoj Bipp ĉesigis sian aktivadon en la E-fervoja movado, sed daŭre pretas laŭbezone konsiladi.

Ni kore gratulas al Hans Bipp!

Mallongigoj:

SAEF: Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj

IFEF: Internacia Federacio de Esperanto-Fervojistoj


La biogramojn kompilis Andy E. KŪNZLI

**INTERNACIA
FESTIVALO**

la jarfina aranĝo

jubilea aranĝo

10-a



27 dec 1993 - 3 jan 1994

**por personoj 25-55 jaraĝaj
kaj junaj familioj**

Sensenstein (FR Germanio)
(15 km oriente de Kassel)

Internacia Festivalo prezentas specifan programon por la "dua generacio" (mezaĝuloj) kaj junaj familioj kun aŭ sen infanoj, sed ankaŭ gejunuloj estas bonvenaj. IF okazas sub lerta gvido kun kompetentaj kunhelpantoj. Bonvolu atenti, ke IS, junulara aranĝo de GEJ, okazas samtempe, sed ne samloke.

Laŭ enketa rezulto la plimulto deziras ĉiun duan jaron reveni al Sensenstein: intertempe la klerigejo estas komplete renovigita, ĉiuj ĉambroj disponas pri duŝo/necesejo kaj estas familikonvenaj kun 2-5 litoj (viaj infanoj povas do dormi kun vi). Naĝejo, saŭno, gimnastikejo je via senkosta uzo!

Kassel/Sensenstein estas bone atingebla aŭtostrate kaj fervoje. Funkcios alventage "transporta servo" por trajn-alvenantoj. En nia IF-oficejo vi povos ŝanĝi viajn valutojn kaj aĉeti bildkartojn; etosoplana Esperanto-gastejo, kun la konata Esperantovino, estos je via ĉiutaga kaj -nokta dispono.

Plena programo kun aliĝilo ricevebla ĉe la redakcio de SES INFORMAS. -FL-

AZB 8053 Zürich
PP/Journal 8053 Zürich

IMPRESSUM

Mitglieder-Information Schweiz. Esperanto-Gesellschaft
Aufgeber: Fritz Liechti Wiesliacher 17 8053 Zürich
Herstellungsort: Copy Quick Zürich. 6x im Jahr
Red. Telefon 01/381 77 13

Ĉ U V I S C I A S ? ?

ke vi povas aboni la sekvantajn Esperanto-
periodaĵojn

EL POPOLA ĈINIO

EVENTOJ

HEROLDO DE ESPERANTO

LA ONDO DE ESPERANTO

MONATO

RUSLANDA ESPERANTISTO

ĉe la Svisa peranto

Christoph Scheidegger

Im Schleedorn 6

4224 Nenzlingen (PC-n-ro 40-52612-7)

oo0oo

REDAKTFINO POR SES INFORMAS 6/1993 estas la
14-a de oktobro 1993.

oo0oo